



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Časopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 3/2019 (217) 12. 12. 2019

Brila reklamo por Esperanto en Prago



La 9-an de junio 2019 membroj de la klubo E-mental' pentris per sprajo grandan reklamon por Esperanto. Ili dekoraciis tiel en Veletržní strato en Prago 7 proksime de la Foira Palaco barilon, kiu staris ĉirkaŭ la tiam ankoraŭ konstruata komerca centro Stromovka. La brila reklamo restis tie bedaŭrinde nur kelkajn tagojn. La fotografiaĵo en nia kovrilo estu konservilo kaj rememorigilo de tiu ĉi merita faro. *(Legu pli sur la p. 8.)*

EL LA ENHAVO

Kroniko de la jaro 2019	2
Aktualaĵoj	3
Mi renkontis esperantistojn en Prago!	10
Ni serĉu spurojn.....	12
Du vivoj de Bertha von Suttner	16
Karel Gott	20

O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brichacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: P. Petřík, J. Košťálek

Kroniko de la jaro 2019 *Aranĝoj kaj okazintaĵoj*

- 24/01/2019 – prelego de T. Břicháček pri la historio de la Bulteno (*klubejo*)
- 07/02/2019 – ĝenerala kunveno; elektita nova estraro
- 16/02/2019 – tradicia renkontiĝo de E-mental' en la praga bestĝardeno
- 21/02/2019 – prelego de P. Chrdle pri Kurisu Kei (*klubejo*)
- 07/03/2019 – diskuto kun Květa Krajičková pri 80-aj kaj 90-aj jaroj (*klubejo*)
- 16–17/03/2019 – E-mentala ekskurso en Leipzig
- 21/03/2019 – prelego de Bernhard Tuidier pri la E-muzeo en Vieno (*klubejo*)
- 04/04/2019 – aperis Bulteno, n-ro 1/2019; vizito de s-anino Hiroko Katayama
- 12–14/04/2019 – E-mentala internacia aranĝo 15-a BIERo en Chotěboř
- 18/04/2019 – prelego de M. Turková pri Kurisu Kei kaj lia tradukado de Hašek (*klubejo*)
- 02/05/2019 – prelego de P. Chrdle pri la familio Ginz (*klubejo*)
- 16/05/2019 – prezentado de Jiří Galuška pri lia vojaĝo tra Yucatán (*klubejo*)
- 30/05/2019 – lanĉo de la libro *Zamenhof – život dílo ideály* en la Pola instituto
- 09/06/2019 – E-mental' pentris reklamon por Esperanto en Veletržní strato
- 22–27/07/2019 – E-mentala internacia aranĝo ĜUPR (Ĝuu Pragon) en Prago
- 24/07/2019 – tradicia E-mentala aranĝo Helpu helpi
- 17/08/2019 – 14-a E-mentala pikniko en Krásná Lípa
- 14/09/2019 – tradicia E-mentala Kuro por Paraple
- 19/09/2019 – prelego de P. Chrdle pri Stanislav Schulhof (*klubejo*)
- 03/10/2019 – prelego de T. Břicháček pri Jaroslav Šustr (*klubejo*)
- 04–06/10/2019 – E-mentala internacia aranĝo 16-a BIERo en Planá u Mar. L.
- 15/10/2019 – aperis Bulteno, n-ro 2/2019 dediĉita al Jaroslav Šustr
- 31/10/2019 – prelego de P. Chrdle pri Bertha von Suttner (*klubejo*)
- 28/11/2019 – prezentado de Vlasta Piščíková pri Sicilio (*klubejo*)
- 30/11–01/12/2019 – tradicia E-mentala aranĝo Kristnasko
- 07/12/2019 6-a Antaŭkristnaska kolbasumado en Saksio en Zittau
- 12/12/2019 – Kristnaska kaj Zamenhofa vespero; aperis Bulteno, n-ro 3/2019
- 14–15/12/2019 – E-mentala aranĝo 7-a Granda loksumado en Bratislavo
- 20–22/12/2019 – E-mentala aranĝo Semajnfino kun opero en Prago

Prosíme, nezapomeňte zaplatit klubové **členské příspěvky na rok 2020**. Výše ročního příspěvku činí **100 Kč**; pro studenty a seniory **80 Kč**. Můžete zaplatit osobně při našich schůzkách nebo bankovním převodem na **bankovní účet č. 2801096435/2010**. Při bankovním převodu uveďte raději svoje jméno. Kontakt: Jiří Mišurec, misuj@email.cz.

Termíny schůzek klubu leden – červen 2020

leden: 9. 1., 23. 1. / únor: 6. 2., 20. 2. / březen: 5. 3., 19. 3.

duben: 2. 4., 16. 4., 30. 4. / květen: 14. 5., 28. 5. / červen: 11. 6., 25. 6.

Vespero kun Věra Ludíková

Margit Turková



Por la interesiĝantoj pri nuntempa poezio la nomo **Věra Ludíková** estas bone konata. Kelkfoje ni jam sciigis la legantaron, ke ŝi estas favoranto de Esperanto ĝistiomgrade, ke ŝi vicigis la Lingvon jam antaŭ 20 jaroj en sian literaturan projekton „Sendu ĝin pluen“. Sendadi pluen, disvastigi en la tutan mondon sian mesaĝon pri humanisma konduto, pri interkomprenado, pri protekto de la naturo – ŝi komencis en la formo, kiu estas por ŝi la plej kara – do per poezio. Oni ja povas supozi, ke multaj poetoj esprimas siajn ideojn kaj sentojn per beletra formo. Ŝi

ĉiujare publikigas ĉarman volumeton, en kiu la poemoj estas interpretitaj en diversaj nacilingvaj tradukoj. Ludíková engaĝigas por la projekto amikojn, siajn konatojn, kiuj esprimiĝas en siaj denaskaj lingvoj. Oni povas diri, ke siasence ŝi kunigas naciojn en siaj poeziaĵoj. Ĉi-jara libreto havas la titolon **Je jaro. Estas printempo, 1+55**. La „enigmo“ estu klarigita: en la projekto estas uzitaj 55 diversaj naciaj lingvoj (neniu dufoje) – nur „1“ apudas ilin ĉiufoje – Esperanto! En la verkoj estas uzitaj ĉu poeziaĵoj de ĉeĥaj esperantistoj (ekz. de Čestmír Vidman), ĉu ŝiaj – en tradukoj de J.Mráz, M.Malovec, F.Patera, J.Werner. Nur en la ĉeĥa kaj Esperanto troviĝas la titolo kaj la mesaĝo kaj la postparolo (en la traduko de M.Malovec). **La 15-an de aprilo 2019** okazis ĉiujara publika legado de la verketo – en persona prezentado de (la menciitaj) diversaj nacioj (la Esperantan prezentis mi, Margit Turková). La solenaĵo okazadas en la spacoj de la Nacia etnografia muzeo, Prago, nune en la historia biblioteko – en kiu estis fondita ĉeĥa esperantista komunumo!

El la supre menciitaj faktoj klariĝas, ke la Poetino alproprigis al si la plej taŭgan manieron por sendi siajn mesaĝojn de kristana humanismo – la internacian lingvon Esperanto...

Rememorigo de František Kožík

Margit Turková

Ĉu tio estas hazardo, ĉu la „providenca destino“, ke en la praga kvartalo Malešice vivis (preskaŭ en unu strato) kvar por ni konataj verkistoj – esperantistoj: Jiří Karen, František Kožík, Josef Rumler, Čestmír Vidman...

Kaj maljunaj kaj junaj „patriotoj“ de la regiono kunigis siajn emojn por prezentadi la „famajn kunloĝantojn“ al la nuna loĝantaro de la kvartalo. Ke ties literaturaj trezoroj ne perdiĝu en profundaĵo de arkivoj, sed vivigu la kulturan etoson. La afero de jubileoj komenciĝis per la poeto Jiří Karen, la persono, kiu estis „la plej videbla“. Plej ofte oni vidis lin en la loka parko, ĉu sidanta, ĉu paŝanta – sed ĉiam kun ia libro en la manoj. Ne povis tion ne rimarki unu lerta 6-jarulo: „*Sinjoro, kion vi ĉiam faras, promenante?*“ „*Mi legas librojn*“. „*Aĥ ja, vi bedaŭrulo*“ ... Nun la parko havas oficialan nomon: „Parko de Jiří Karen“. Okaze de tiu afero realiĝis publika prezento de verkoj de Jiří Karen en kulturaj institucioj de la Prago 10- kvartalo. Lian riĉan agadon en la Esperanta kampo prezentis mi, kaj Věra Ludíková – redaktinto de J.K.-verkaro.

Pasis du jaroj, kaj **la 16-an de majo 2019** okazis alia jubileo-festo: la 110-a naskiĝdatreveno de „la plej granda“ ... ja ĝuste je la 16-a de majo 1909 naskiĝis **František Kožík**. Lin oni ne bezonas prezenti – tuta ĉeĥa nacio konas lin – inter ili ĉeĥaj esperantistoj. La kultur-funkciuloj plenumis sian ŝatatan devon kaj kunigis la favorantojn de la Verkisto en la Malešice-biblioteko. Min ili favoris, ĉar ĉe la supre menciita Karen-evento mi atentigis ilin pri František Kožík – esperantisto. Do vere – la programo enhavis parton pri tiu ĉi lia agado, kiun plenigis plejparte mi. Dank’al M.Malovec, kiu plenumplekse priskribis la agadon de esperantistoj en la Radio-elsendado en Brno, mi povis informi la partoprenantojn pri la etapo, kiam en la elsendejoj Brno, Bratislava, Prago, Ostrava estis prezentita la ĉeĥa kulturo per la fama **Verda ĉaro**, kiun „tiris“ ankaŭ František Kožík. Por ni ĉiuj fariĝis la evento neforgesebla, ĉar inter ni estis la filino de F.K. – Alena Kožíková... Pri la vivo kaj verko de sia patro ŝi scias ĉion – krom la tradukaĵoj, per kiuj ja povas „fieri“ ni, esperantistoj. Ĝoja estis konscio, ke danke al Vondroušek, Karen, Malovec enmondiĝis la verkoj **Největší z pierotů** (*La plej granda el pierotoj*), **Světlo v tmách** (*Lumo en tenebroj – pri Komenio*), k.a.

Kompreneble, ke mi ne preterpasis la novaĵojn – la operon „Sternenhoch“ kaj la Esperantan vikipedion. Sinjorino Alena K. tuj notis tion en sian kajereton kun la vortoj: „Mi devas tion pli profunde ekkoni“. Tion ni, esperantistoj, certe kun ĝojo akceptas...

Libra donaco el Svedio

Tomáš Břicháček

Samideanoj el sveda Eldona Societo Esperanto (ESE) en majo 2019 bonvole donacis al nia klubo sep valorajn librojn, kiuj pliriĉigis nian bibliotekon.

Temas pri sekvantaj libroj:

- Vilborg E: *Etimologia vortaro de Esperanto* – volumoj 2, 3, 4, 5
- *La Dharmo-pado*
- Henrikson A., Lindahl E.: *La frakseno Igdrasililo – Antikva dia historio*.

En mia respondo al la prezidanto de ESE Leif Nordenstorm mi nome de nia klubo elkore dankis. Mi informis lin, ke la libroj iĝos parto de la kluba biblioteko kaj ke ĉiuj klubanoj povos pruntepreni ilin.

Lanĉo de libro pri Zamenhof

Tomáš Břicháček



Foto: Luděk Neužil

La 31-an de majo okazis en la Pola instituto publika lanĉo de la libro *Ludvik Lazar Zamenhof – život dílo ideály* de Alexander Korženkov. Libron ĉeĥigis Jindřich Košťálek kaj eldonis ĝin KAVA-PECH. Patrono de la libro volonte iĝis mi.

Forpasis Helena Štruncová kaj Marie Drašnarová

Kun doloro ni anoncas, ke fine de septembro forpasis en la aĝo de 94 jaroj iama prezidantino de nia klubo s-anino **Helena Štruncová** (al kiu estis dediĉita artikolo en Bulteno n-ro 1/2015) kaj ke iam en junio estis murdita praga esperantistino **Marie Drašnarová** en la aĝo de 73 jaroj (vidu la paĝon 6).

Za Marií Drašnarovou

Pavel Polnický



Marie Drašnarová
(12. 12. 1946 – ? 2019)


Ŝi loĝis kaj studis en Prago. Esperanton ŝi lernis verŝajne en iu kurso gvidata de Mikuláš Nevan en la jaroj 1962 – 64 kaj tuj aktive komencis labori en tiama junulara sekcio de ĈSEK. Post la jaro 1968 Nevan foriris labori al UEA kaj multaj el praga grupo elmigris kaj Marie finis sian aktivadon. Dum preparoj de praga UK 1996 ŝi venis kunlabori kaj bone zorgis pri siaj taskoj. Profesie ŝi instruis lingvojn en altlernejoj. Ŝi ne havis propran familion, en lastaj jaroj ŝi vivis kun amiko Přemysl Herzán kaj dum komuna somera libertempo estis ambaŭ brutale mortigitaj. Honoron al ilia memoro.

Marii Drašnarovou (pro kamarády a přátele Dulinu) jsem poznal někdy v roce 1965, když jsem se zapojil do činnosti Sekce mládeže ČSEV. Tehdy v sekretariátě sekce v Jindřišské ul. měla na starosti podle Informila 3/67 z 18. 1. 1967: organizace odborných seminářů a školení mladých čs. esperantistů, korespondenční služba a inzerce, hlavní redaktorka STARTA, bulletinu pro zahraniční partnery. Vzpomínám, že ve velké místnosti sedělo několik mladých a opravdu pracovali, každý na svém úseku. Práce bylo asi dost, když si představíte, že se vše psalo na stroji a posílalo poštou. A v seznamu mladých bylo 107 adres! Po vzniku ČES a oficiální Sekce mládeže se situace změnila. Mikuláš Nevan s manželkou odešli do Rotterdamu, kde Mikuláš pracoval jako kongresový tajemník v UEA. Několik dalších členů vedení odešlo do emigrace (Egon Moravec, Jaroslav Suchánek, Václav Vaňkát, Karel Bartošek aj.) a s aktivní činností pomalu skončila i Dulina. Občas se za mnou zastavila v sekretariátě svazu, kde jsem pracoval, něco mi pomohla, ale po mém nuceném odchodu z funkce tajemníka jsem s ní ztratil na delší dobu kontakt.

Když jsme začali připravovat UK v Praze, kontaktovali jsme Dulinu a ona to přijala a velmi aktivně se zapojila do práce. Od té doby se mi občas ozvala a při svých pravidelných návštěvách Poděbrad (na to byla zvyklá z dětství, kdy „lepší“ pražské rodiny jezdily na víkend mimo Prahu a oni jezdili do Poděbrad). Také já jsem ji několikrát navštívil v její vile a vzpomínám, jak při jednom setkání po roce 1989 ji Mikuláš Nevan domlouval, že by měla vilu prodat a koupit si byt a jezdit po světě a ona to rezolutně odmítla... a nakonec kvůli této vile přišla o život.

O. Březina – překlady básní aneb Domluvíme se v EU?

Viktor Dvořák



Od 11. do 24. června 2019 se uskutečnila výstava v předsáli Jednacího sálu Senátu Parlamentu ČR v Praze pod záštitou senátora RNDr. Miloše Vystrčila, který přítomné přivítal. Úvodní slovo – Jiří Höfer, recitace básně *Moje matka* – Magdalena Krejčová a hudební doprovod na housle – Petr Hudeček. Viktor Dvořák dále komentoval obsah na panelech podle autorů překladů Březinovy básně *Moje matka / My Mother / Mia Patrino*, ve kterých je obsah, předmluva i ediční poznámka v jazyku českém, anglickém a esperantském. Výstava se konala při příležitosti 150. výročí narození a

90. výročí úmrtí Otokara Březiny. Měla za cíl ukázat na obtížnost šíření literatury malých národů ve světě a s tím souvisejícími problémy dorozumívání. Předkládá se k úvaze možnost využití esperanta, které je univerzálním jazykem, který odpovídá pojetí Jana A. Komenského v díle VIA LUCIS, kapitola XIX. Mnohojazyčnost je stále překážkou a s lítostí lze konstatovat, že naplněním „Barcelonského“ cíle je jen omezeně vyřešen problém vzájemné komunikace v EU. K velké škodě je, že tvůrci dokumentu KOM 566, Brusel (18. 9. 2008) potřebu univerzálního jazyka zcela pomíjí. Výstavu připravil Ing. Viktor Dvořák, CSc., ze svého dlouholetého bádání a pátrání po překladech Březinova básnického díla, jeho překladatelích a dědicích autorských práv. Vyhledání překladatelů a získání souhlasu se zveřejněním poskytnutých překladů a materiálů byla dlouholetá, časově velmi náročná práce. Výstava byla výsledkem spolupráce s Klubem přátel esperanta ve Svitavách, Spol. O. Březiny v Jaroměřicích nad Rok., Ústavem pro českou literaturu AV ČR v Praze, Moravskou zemskou knihovnou v Brně a Památníkem národního písemnictví v Praze. Byl projeven zájem o opakování výstavy v rodišti Otokara Březiny v Počátkách, Jaroměřicích nad Rokytnou a Galerii Františka Bílka v Praze, prostřednictvím Spol. F. Bílka.

Vyšlo v Bulletinu Společnosti Otokara Březiny, srpen 2019

Reklamo por Esperanto

Vlasta Piščíková

La 9-an de junio 2019 membroj de la klubo E-mental' kreis en Prago reklamon por Esperanto. Ili pentris ĝin sur barilon ĉirkaŭ konstruata domo en vigla strato de Prago. Posedantoj de la barilo – la konstrufirmao – mem proponis al homoj, ke ili laŭplaĉe kreu.

Unue ili parton de la barilo nigre kolorigis per farbo, kiun ili hazarde trovis en proksimeco. Per penikoj kaj eĉ per propraj manoj ili dum kelke da minutoj preparis la spacon por plua kreado.

Poste devis esti solvita problemeto, kion desegni sur la barilon. Estis klare, kiujn ĉefajn vortojn skribi, sed kion plu? Feliĉe en la grupo estis juna novulino, kiu studas reklamon kaj ŝi donis ĉefan aspekton. Poste jam ĉiuj diligente desegnis.

Sur alia parto de la barilo ili rimarkis jam estantan verdan stelon, kiu instigis ilin por plua kreado kaj ili alskribis grandan vorton ESPERANTO.

Bedaŭrinde la pentraĵo restis en la barilo nur kelkajn tagojn, ĝis kiam niaj sprajistaj konkurantoj surkovris ĝin per siaj skribaĉaĵoj.

Esperantista geedziĝo



La 20-an de julio 2019 geedziĝis gesamideanoj Vít G. Mišurec kaj Veronika Venislovas. La sekvantan tagon post la oficiala geedziĝo okazis Ementala geedziĝfestoj.

Ni elkore gratulas kaj deziras multe da feliĉo kaj sano.

Helpu helpi 2019

Vlasta Piščíková

La 24-an de julio 2019 okazis jam la sesa aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental' aĉetis brikojn por karitata projekto Briko, kiu helpas konstrui labortrejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago. Ĉi-foje helpis ankaŭ partoprenantoj de aranĝo ĜUPR, kiu ĝuste okazas en Prago.

Estis kolektita mono por 40 brikoj!

La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj...

...kaj enmetitaj en simbolan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas amasoj da turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas la Esperanto-brikojn, kaj tiel oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj.

Grandan dankon al ĉiuj partoprenantoj, kiuj helpis surloke...

...kaj apartan dankon al eksterpragaj kaj eksterlandaj bonkoruloj, kiuj ne hezitis sendi monon!!!

Tri sinsekvaj aranĝoj kun Martin Stuppnig en Ĉeĥio

Petr Chrdle

Senpere antaŭ sia 94-jariĝo, en oktobro 2019, faris la fama aŭstra esperantisto Martin Stuppnig vojaĝon al Ĉeĥio, kie li trifoje prezentis sian tre sukcesan libron, eĉ en tri lingvaj variaĵoj: La germana originalo, la Esperanto-versio kaj la freŝe eldonita ĉeĥa traduko.

Unue, li partoprenis la Konferencon de Ĉeĥaj fervojistoj-esperantistoj en Kořenov de la 11-a ĝis la 13-a de oktobro. Due, la 15-an de oktobro okazis la unua publika lanĉo de la libro en la ĉeĥa en la aŭlo de la Humanisma gimnazio en Prago, kie li prezentis ĉiujn tri versiojn de la libro, post kiam sekvis diskuto de la aŭtoro kun la ĉeestantoj kaj aŭtografado.

Fine, la dua oficiala publika lanĉo okazis en la Mahen-biblioteko en Brno la 18-an de oktobro. Ĝi okazis lige kun la kongreso de ĈEA, kiun Martin ankaŭ partoprenis. La programo estis simila kiel en Prago.

Jen la historio de tiu mirinda libro, per kiu Martin Stuppnig sukcese debutis kiel verkisto en la aĝo de preskaŭ 90 jaroj:

Ĝi aperis unue en la germana kun la titolo *Militimpressionen*, sekve en Esperanto kun la titolo *Home en senhomeco* en la traduko de Jozefo Horvath. Ĉar multaj esperantistoj deziris aĉeti ankaŭ la germanan originalon, kiu dume elĉerpiĝis, mi eldonis en malgranda kvanto la duan germanan eldonon kun la pli trafa titolo *Menschlich in der Unmenschlichkeit* kompletigitan pri la tekstoj aldonitaj en Esperanto-eldonon: Aldonaĵoj pri la batalo ĉe Monte Cassino, kiun Martin devis partopreni kaj en la libro priskribas siajn priajn memorojn, kaj pri britaj militkaptitejoj en Afrika, kie li travivis du jarojn, sed ankaŭ koncizan tekston pri la aŭtoro. Ĉar la eldonkvanto 300 ekzempleroj mirakle baldaŭ elĉerpiĝis, jam estas eldonita la dua Eo-eldono.

Kaj nun finfine aperis ankaŭ la ĉeĥa traduko kun la titolo *Vždy lze zůstat člověkem* (*Ĉiam eblas resti homo*, kio estas parto de la citaĵo de J. W. Goethe, kiun ni elektis kiel moton: *Ne ĉiu povas esti heroo, sed ĉiam eblas resti homo*) en la traduko de la duopo Jindřiška Dubinová kaj Karel Kauer.

Kiel bazo de la traduko oni uzis la duan, kompletigitan germanan eldonon. Mi forte esperas, ke ĝi estos same sukcesa kiel la germana originalo kaj la Esperanto-versio.

Vždy lze zůstat člověkem od známého rakouského humanisty a esperantisty Martina Stuppniga je memoár, v němž autor popisuje své zážitky z druhé světové války, kdy musel bojovat za vítězství Třetí říše. První část se zaměřuje zejména na prožitky během jedné z nekrutějších bitev války o Monte Cassino, druhá část popisuje jeho dobrodružství v anglickém zajateckém táboře v Africe. Z německého originálu Menschlich in der Unmenschlichkeit přeložili Jindřiška Dubinová a Karel Kauer. Přílohy o bitvách kolem Monte Cassina a o britských zajateckých táborech v Africe napsal Petr Chrdle.

Mi renkontis esperantistojn en Prago!

Hiroko Katayama



La unuan semajnon de aprilo mi vizitis Pragon, ĉefurbon de Ĉeĥio, kun mia edzo, kiu partoprenis en la simpozio okazinta tie.

Mi deziris renkonti esperantistojn en Prago. Antaŭ ekveturo rete studinte mi eksciis, ke en Ĉeĥio troviĝas pli ol 30 lokaj kluboj, kiuj estas organizaĵoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la membro de UEA.

La Esperanto-Klubo de Prago estis fondita en la jaro 1902. Du Universalaj Kongresoj de UEA okazis en Prago. En la jaro 1921 estis la fonda kongreso de SAT dum la 13-a UK. En la jaro 1996 je la 81-a UK prezentita estis la Manifesto de Prago, kiu konsistas el sep

principoj de movado. Prago delonge estas la centro de serioza agado por Esperanto.

Kun helpo de s-ro Yamaguti mi sendis retleteron al la delegito de UEA en Ĉeĥio, s-ro Petr Chrdle (karesnome Petro), kiu jam dekfoje vizitis Japanion, en Nagojo vizitis la ĉambiron de Nagoja Esperanto-Centro (NEC), kaj tranoktis ĉe ges-roj Itoo.

Li respondis al mi, ke la lokaj kunvenoj okazos dum nia restado, kaj ni estos bonvenigotaj. Li sendis informon al aliaj ĉefuloj en Prago.

La 3-an de aprilo matene s-ro Josef Trojan, eks-delegito de Prago, kaj mi kune promenis en la malnova kvartalo, en kiu restas belaj mezepokaj konstruaĵoj.

Vespere mi vizitis la kunvenon de la klubo E-mental', gvidite de samideanino Vlasta Piščíková, ĉefo de la klubo kaj unu el ĝiaj fondintoj en la jaro 1998.

E-mental' celas al uzado de Esperanto en ĝuoriĉeco, kaj akceptas tiujn (precipe junulojn), kiuj hezitas aliĝi al tradicia klubo.

Regulaj kunvenoj okazas ĉiun duan merkredon vespere ĉe la hejmo de membro, al kiu venas anoj kun iu konkreta temo kaj bongustaĵo.

Tiuvespere ili preparis kvizojn pri Honŝuo (la plej granda insulo de Japanio), pro la gasto el Japanio. Kvizoj estis tiel malfacilaj, ke mi povis nur malpli ol triono ĝuste respondi.

Ankaŭ brazila juna esperantisto partoprenis la kunvenon.

La 4-an posttagmeze Petro kaj mi promenis en la urbo kaj iris al la kunvenejo de la Esperanto-Klubo de Prago. La ĉambro troviĝas centre de la urbo, ĉe la strato proksima al Venceslao Placo, kie okazis eventoj signifaj en la ĉeĥa historio, nome Praga Printempo kaj Velura Revolucio.

La kunveno okazas ĉiun duan ĵaŭdon vespere, kutime de la 17-a ĝis la 19-a horo. Por vidi min kolektiĝis ekde la 16-a multaj membroj inkluzive de kelkaj el E-mental'.

Petita, ke mi parolu ion pri Japanio, mi prezentis la urbon Nagoja, la kastelon, la palacon, kaj la Generalon Iejasu Tokugaŭa, kiu ordonis konstrui ilin.

Mi donacis al la klubo librojn, kiujn mi kunportis, t.e. la bildolibro „Vostoj ridas!” verkita de s-ino Ĵunko Ito, kaj „Gon-Vulpo kaj aliaj rakontoj” de Nankiĉi Niimi (la memoraĵo por partoprenantoj al la Japana Kongreso en Inujama 2009).

Mi ankaŭ kunportis japanajn organojn, La Informilo de NEC, La Revuo Orienta de JEI, ktp., kiujn ĉeestantoj kun intereso tralegis.

S-ro Tomáš Břicháček, la prezidanto de la klubo, donis al mi la plej novan version de ilia revuo „Bulteno” eldonita je tiu tago.

Li skribis por ĝi raporton pri la agado de la klubo ekde la jaro 2014 post sia prezidantiĝo. Li kaj la komitatanoj laboris por modernigo de la klubo: enkonduko de la klubo en la 21-an jarcenton, en la ciferecan epokon.

Interrete legeblas la teksto de la Bulteno, kaj troveblas ankaŭ en YouTube la prelego de la prezidanto farita dum la ĝenerala kunveno de la klubo en februaro 2019.

Dum mallonga vizito mi havis tre signifoplenan tempon.

Mi eksciis, ke ankaŭ en Prago oni ĉagreniĝas pro maljuniĝo kaj malmultiĝo de membroj, sed malgraŭ tio junuloj ĉiam penadas naski agadon novstilan kaj allogan – bazite sur la trezoro de pasinteco, kaj harmonie – ĝuste tiel, kiel agas la urbo Prago.

Ni serĉu spurojn

Jana Cířhová-Hrdliĉková



*Jes, ni serĉu la spurojn de niaj antaŭuloj – pioniroj, kiuj en pasintaj tempoj faris sulkojn sur nia Esperanto-kampo. Unu el ili estis **Jana Cířhová**. Ni legu pri ŝia aventuroplena Esperanto-vivo...*

Margit Turková

„Á, sinjorino, vi estas ankaŭ esperantistino... mi aŭdis ion pri **tio**, sed onidire **tio** estas artefarita, do kion fari kun **tio** – kaj entute nun ni havas aliajn problemojn, ĉu ne ?...“ Tiel kaj simile esprimiĝas homoj, kun kiuj mi renkontiĝadas, kiuj havas certajn

kontraŭstarojn vidante la Esperantan signon sur mia vestaĵo. Ili ja ne konas la kernon de la fenomeno Esperanto – ili „nur aŭdis pri ĝi“, sed tuj rezolute la aferon misjuĝas kaj kritikis kaj rifuzas. Sed ĝuste tion ni ne timu!

Sur la alia flanko mi spertis ion tute alian, kiam mi vojaĝis... Ne estis tio vojaĝoj turismo-celaj, privataj – entute ne! Tiam, antaŭ jaroj, kiam mi estis ano de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-organizo, la redaktorino kaj interpretistino en la eksterlanda radio-elsendado por Aŭstrio kaj estrino de la virina organizaĵo – kaj samtempe profesia ĉiĉeronino de la Pragaj Inform-servoj (PIS), mi estis – sub la aŭspicio de la Ministerio por edukado kaj kulturo – delegita por la prelego-vojaĝo en Jugoslavio kaj Francio. Mi volas paroli precipe pri tiu dua menciita; ĝi havis pli da sukceso, do ĝi forlasis en mi pli agrablajn kaj pozitivajn rememorojn, pri kiuj mi volas sciigi miajn legantojn. Pli ĝojigajn kaj samtempe pli instruigajn... la vojaĝo por mi ne estis nura amuzaĵo, kiel oni povus opinii...

B.v. imagi ne tute junan virinon, en ĉiu mano valizon, kiu ĉiutage „pilgrimas“ de urbo al urbo laŭ la programo destinita de la Franca-Esperanto Asocio.

Unue la alveno, bonvenigo sude de Francio – en Tuluzo. Kie oni tuj akceptis min „sia“ – ĉar kie ajn loke inter esperantistoj – vi tuj estas „ilia“. Oni loĝigis min ĉu en hotelo, ĉu en iu familio – ĉion pagis la Asocio, do sen financaj zorgoj flanke de mi.

Kaj nun la prelegoj – celo de mia turneo.

Pro ili mi travivis multon belan – kaj ankaŭ malbelan, amarplenan, kaj tion

mi nun rakontos.

Je la unua vico estis al mi dirite, ke mi estas virino eĉ „la plej svelta“ – inter francinoj (konataj pri sia eleganteco). En la tabakejo mi estis alparolita, ke mi certe ne estas urbanino, sed parizano... nun koncerne la akcenton (de la franca) . Ilin mi plene embarasigis, ke ne el Parizo, sed eĉ el Prago mi estas.

Post inaŭgura bankedo inter esperantistoj mi havis la unuan prelegon; pri Prago, pri ĝiaj vidindaĵoj, kun lumbildoj. Estis ĉirkaŭ 100 homoj. Kaj sur la podiumo du homoj – la prelegantino kaj la interpretisto. Mi parolis en Esperanto flue kaj rapide, kaj same mia interpretisto tradukis Esperante, sen problemoj, miajn klarigojn al la bildoj. Eble post 2 horoj oni sentis, ke la publiko interne komprenis la adekvatecon de ambaŭ lingvoj – la Esperanta kaj la franca, ke ĝi akceptas tion kaj tuj alvenis sukceso: ili demandis pri Ĉeĥoslovakio, pri la vivo, pri diversaj aferoj. Kaj post la fino homoj komencis sin subskribadi en la kurson de Esperanto! Tio ja estis ĉefe la celo de nia kampanjo!! Oni eĉ entreprenis intervjuon kun mi, en la urba elsendo-radio. Sed tie mi parolis france – kvankam ili pensis, ke la francan mi ne regas. Ni – organizantoj, estis fieraj pri la sukceso... sed baldaŭ montriĝis, ke mia scio de la franca povas fari „konfuzigon“.

Tion ni spertis en la urbo Castres. Malgranda, sed ĉarma loko! La prelegon vizitis gimnazio-lernantinoj, mian prelegon ili sekvis tre atentoplene... Sed la interpretisto faris eraron koncerne la jarcenton. Mi reagis spontane – france lian eraron korektis – kaj kaŭzis la „huronan“ ridegon; la efekto de la interpretado iom malfortiĝis – sed ĉu gravas?!

Ekde tiam mi jam ĉiutage vojaĝis – ĉu per buso, ĉu per aŭtomobilo aŭ trajno – al diversaj urboj – Muzret, Hyerés, Nice, Nimes, Nantes k.a. Mi ekkonis vidindaĵojn, homojn, kiel ili vivas. Sed ĝuste danke al Esperanto mi sentis min ĉie kiel hejme. En Marsejlo estis la sukceso precipe neatendita, same en Aix-en-Provence. Eble plej multe da aŭskultantoj estis en Perpignan, ĉe la limo al Hispanio. Tie ili unue proponis al mi tagmanĝon en tipe hispanagastejo, kaj poste la neforgeseblan vesperon! Alvenis ĉirkaŭ 250 homoj! Alvenis eĉ pariza kantisto kaj donacis al mi, sur la podio, grandan bukedon de ruĝaj diantoj. La homoj aplaudis, larmis, estis ekscititaj – simple laŭ sia natureco kaj lokaj kutimoj. Post la prelego alvenis al mi viroj, virinoj, knabinoj kaj alparolis min – ĉeĥe! Kaj ploris pro kortuŝo. Ja estis tio ĉeĥoj tie loĝantaj 30 jarojn, nun ili havis longe ne havantan okazon paroli en sia naskiĝlingvo. Pro tio ankaŭ mi larmis. Simple dirite la vespero tre sukcesis kaj venontan tagon oni skribis en la gazetaro pri tiu rara kaj eminenta evento. Ja, tio estas rememoroj neforgeseblaj, ĝis hodiaŭ mi posedas gazet-eltranĉaĵojn, kie estas ankaŭ mia fotografaĵo en la momento, kiam mi mane montras al la diapozitivaj. Simile estis ankaŭ en Avinjono. En Nimeso oni komencis per vizito de bildo-ekspozicio kaj okaze de tio ni estis fotografiitaj grupe – japanino en

sia kimono, kaj ankaŭ loka urbestro kaj urbkomitatoj. Post ĉiu prelego oni okazigis bankedon je mia omaĝo. Mi devas konfesi, ke el tiuj mi ĉiam havis terurosenton, pro multaj kaj diversaj manĝaĵoj. Mi havis dilemon ne ofendi la gastigantojn. La menciita japanino estis per mia Esperanto kaj la parolmaniero tiel entuziasmigita, ke ŝi kunvojaĝis ankoraŭ en venontan urbon.

Nur en unu urbo oni pri la afero nek skribis nek parolis, je tio mi havas malĝojan rememoron. Ankaŭ ĝin mi devas konfesi. La urbo Hyerés – la regiono preskaŭ jam subtropa, belega – palmoj, ŝtonoj, malhumido. Estis jam libertempa, feriado sezono, eble ne estis bonaj, kapablaj organizantoj... jam ekde la komenco montriĝis necerteco – ĉu estos projekcia aparato, ĉu alvenos homoj. Finfine en la urbodomo kolektiĝis ĉirkaŭ 120 ĉeestantoj. Ankaŭ la urbestro. Do, sufiĉe da... Sed, ho ve – la tradukanto estis tre maljuna sinjoro, li volis fieri antaŭ la publiko, ke li eminente scipovas traduki; sed – li malbone aŭdis; mi devis trifoje ripeti la saman frazon, ĉar li senĉese demandis: „Kion?“. Homoj komencis esti senpaciencaj, protestis. Sed poste la aferon savis unu itala ĝardenisto, kiu tradukis sufiĉe bone kaj la maljuna sinjoro adiaŭis nin – „por momenta maldispono“. Mi sentis tre varmajn momentojn – ja mi ne sciis, ke atendas min eĉ pli turmentigaj... En unu momento kraketsono – kaj la aparatlampo ĉesis funkcii. Ho, teruro! Kiam oni lumigis la salonon, ni priparolis kion nun. Ni konsentiĝis, ke ni babilu pri Ĉeĥoslovakio ĝis oni funkciigos novan lampon. Kaj ĝuste tio montriĝis kiel granda misfaro!! Mi ja troviĝis en la loko, kie la urbanoj, inkluzive la urbestron, havis tute alian opinion pri la mondo kaj pri politiko ol havis ni, en niaj landoj. Finfine mi entute „elfalis“ el la diskuto, eĉ la salonon ekregis du homoj – ĉiu en alia angulo – unu estis homo, kiu konis nian landon, kaj la alia estis la urbestro, kiu malakceptis la avantaĝojn de nia sistemo. Kaj tiuj du komencis sin abrupte ataki, la aŭskultantaro elstaris, protestis dirante, ke ili alvenis partopreni artcelitan prelegon, ne la politikan diskutadon – kaj mi staris tie soleca, flankigita, negrava persono. Oni povas imagi miajn sentojn...! La aparato estis riparita, mia prelego daŭrigata, poste finita, homoj ekstarante forradis, malvarmaj salutoj, neniu entuziasmo, nur unu virino alvenis (malantaŭ la kurteno) senkulpigi siajn kunurbanojn: ke mi alvenis kun bonaj intencoj – kaj ili tiel fie kondukis...

Per tio finiĝis jena malsukcesa vespero, pri kiu mi cetere rakontis al Tuluzo, al la organizanto de la tuta preleg-evento. Sed la tutan nokton mi ne ekdormis, profunde turmentiĝinta, kvankam neniel mi kulpis pro la afero. Venontan tagon min la menciita ĝardenisto veturigis per sia aŭtomobilo en la urbon Nico, 30 kilometrojn. Tie oni min akceptis kiel la menciitan preleganton, pri kiu estas devo zorgi – nenion plu... Eĉ mia prelego – onidire propaganda – ne okazis; „onidire“ por la urbanoj ĝenerale estas tiom da kulturaj eventoj – kiu interesiĝus pri Esperanto?! Tamen –

por esperantistoj mem mi povis prelegi; sed ili kunvenis nemultaj, kaj nek kapablaj kompreni, nek traduki Esperanten – do mi mem prelegis en la franca. Tion ili akceptis, tio plaĉis al ili – aŭdi pri niaj vidindaĵoj. Rekompence ili montris al mi vidindaĵojn siajn: ni promenis sur plaĝo, sur marbordo, multajn belegaĵojn de la urbo mi vidis, belajn du tagojn mi havis tie en Nico. Poste ili enmanigis al mi la veturbileton kaj sidigis min en la trajnon direkten al Tours; mi bezonis ŝanĝi trajnon en Bordojo, sed onidire ne estas komplikajo... ĉar per telefone estis traktite, ke esperantistoj en Tours atendos min ĉe la trajno. Adiaŭoj, dankoj... ek al la Bordojo!

Tie mi elvagoniĝis kaj demandis pri konekto al Tours. „Post 4 horoj“... Vane mi klarigis (al kiu??), ke mi estas atendata, ke mi havas nenion por manĝi, en la poŝo nur 3 frankojn, ktp.,ktp. „Ne pli frue, nur post 4 horoj, post la noktomezo.“ Do, kion fari. La mono sufiĉis almenaŭ por aĉeti du bananojn por trankviligi mian stomakon, kaj ĝisatendi mian trajnon. „Ĉu ĝi estas la mia, mi devas certiĝi“ – diris al mi mia „interna voĉo“. „Jes, estas la via“, certigis min la kondukto kaj unu maljuna viro, kiu fariĝis mia „protektoro“ kaj senĉese min prizorgis kaj konsiladis. Sed mia „interna voĉo“ tamen ne estis trankvila. Kelkajn minutojn antaŭ la trajnoforiro mi denove demandis (kompreneble alian personon), kaj estis al mi dirite, ke mia ĝusta trajno staras sur apudaj reloj. Mi panikis, abrupte kaptis mian valizon kaj ek en la apudan! Jam mi sidiĝis – kaj en la momento mi konstatis, ke mi ne havas la kofreton... Denove paniko... Elsalti, rapidigi en la neĝustan trajnon, kapti la kofreton... Kiam mi sidiĝis sur mian lokon, la „ĝusta“ trajno ekis...

Kaj nun mi sentis „ĉion egala“: mi estis ekscitita, malsatega, lacega, malfeliĉa pro malsukcesoj, mi estis preparita por „ĉio malbona“... Finfine Tours! Kompreneble, ke en la stacidomo neniu min atendis, ja jam pasis la horo de mia anoncita alveturo. Post longa hezitado mi alparolis iun viron – kaj bone mi faris; li konsilis iri en la inform-oficejon, kiu ne estis malproksime. Senespere mi klarigis, kio okazis, ke mi havas du adresojn, sed... nu mi parolis. Kaj la deĵoristino alrigardis la dorsan flankon kaj diris: „Ĉu vi ne estas jena madamo – sur la afiŝo?“ Mi returne rigardis kaj – „Jes, tio estas mi!“. La afiŝo anoncis mian turneon en la urbo. La deĵoristino prizorgis alvenigi mian adresaton, tiu forveturigis min per sia aŭtomobilo (kaj restis mia longdaŭra amiko) – kaj la aferoj jam disvolviĝis laŭ la plano. Kvankam ankaŭ ni timis, ke ne alvenos multe da homoj – sed finfine estis tiom da aŭskultantoj, ke ne sufiĉis la sidlokoj, ili devis stari ĉe muroj – kaj aŭskultis tiom atenteme, ke estis „kiel en preĝejo“ (se la prediko estas profunde efika). Poste malgranda knabeto transdonis al mi grandan florbukedon kaj kison (reciproke). Do, post la momentoj antaŭaj, amarplenaj, mi eksentis la „animbalzamon“ pro la amikeco kaj kompreno – ne nur de esperantistoj. Kompreneble – ke kun la samideanoj el Tours mi estis kaj restis en la plej varmaj kontaktoj. Sed ankoraŭ ne estis fino de mia

rondvojaĝo. En la urbo Agers – 150 aŭskultantoj, la urbo Naus – kie ne estis al dispono la projekci-aparato – do ni renkontiĝis nur en klubejo, tie mi donacis al ili miajn diapozitivojn, gramofondiskojn, flugfoliojn... la komplimento de la klubestro: „neniam mi aŭdis inon paroli Esperante tiom rapide kaj flue“...

La lasta turneo-loko estis en Parizo. Sen prelego. Kun la reĝisoro J. Maheé traveturis mi (en lia aŭtomobilo) Parizon. Li estis eminenta esperantisto, kiu veturigis min venontage al la flughaveno, tre afable restis kun mi ĝis la forflugo – kaj kompreneble ni restis sinceraj amikoj. Ni longjare korespondis. Li esprimadis al mi dankon „nome de la tuta Francio“ – kaj per tio li konfirmis, ke mia rondvojaĝo „en la servoj de Esperanto“ ne estis vana, ke ĝi prenis siajn fruktojn.

Miaj rememoroj estas neforgeseblaj.

Prago, 1984

Transskribis Margit Turková

Du vivoj de Bertha von Suttner

Jindřich Košťálek

Kiam mi la unuan fojon aŭdis de Petro Chrdle, ke lia eldonejo KAVA-PECH intencas eldoni librojn de kaj pri la unua virino, kiu ricevis Nobel-premion pri paco, mi iomete hontis, ke mi neniam antaŭe aŭdis la nomon kaj nenion scias pri ŝi. Mi tuj komencis traserĉi interreton ... kaj trovis la libron „*For la batalilojn!*“ de Bertha von Suttner. Mi tuj eklegis ĝin por iomete pleniĝi la truojn en miaj scioj.

Por mi (kvankam ĝi estis verkita fine de la 19-a jarcento) ĝi estis vere atentokapta biografio romano. La heroino de la libro, grafino Marta Althaus, naskiĝinta en nobela viena familio (ŝia patro estis generalo en la aŭstria armeo kaj ŝi multfoje aŭskultis rakontojn de sia patro pri famaj bataloj) estis edukata en patriota etoso, ke la plej alta ideo de homa grandeco estas personigita en milita heroo. „*Veran admiron mi nur sentis por la gajnintoj de bataloj. Ili ja estis ĉefe tiuj, kiuj efektivigis la historion, kiuj gvidis la sorton de la popoloj.*“

Kaj ŝi eksplikas tion jene: „*Ĝenerale la historio, kiel oni ĝin montras al la junularo, fariĝas la ĉefa kaŭzo de la militadmiro. Enradikiĝas ĉe la infanoj la ideo, ke la Sinjoro de la armeoj senĉese ordonas batalojn, ke ili estas, por tiel diri, la veturiloj, per kiuj la sortoj de la popoloj rulvolvas tra la tempoj; ke ili estas la plenumo de neevitebla natura leĝo, kaj devas ĉiam reokazi de tempo al tempo, same kiel ventegoj kaj tertremoj.*

Ĉu do ekzistas pli bela morto ol la morto sur batalkampo de honoro, pli nobla senmorteco ol tiu de heroo? Ĉio ĉi klare montriĝas en ĉiuj lerno- kaj legolibroj. En ili, krom la fakta historio, prezentita nur kiel longa ĉeno de

militaj okazintaĵoj, ankaŭ la diversaj rakontoj kaj poemoj ĉiam raportas nur pri heroaj bataloj. Tio estas apartenaĵo de patriota edukado.“

Ŝi estis diligenta kaj inteligenta lernantino (ĉiam kun privataj edukistinoj kaj instruistoj). Ne povante kontentigi sian ambicion per gajnado de bataloj, kiel heroa virgulino (ŝia tiama ekzemplo estis Jeanne d'Arc), ŝi almenaŭ volis elstariĝi kiel bonega lernantino: ŝi atingis preskaŭ perfektecon en la konoj de la franca kaj angla lingvoj, ŝi fervore lernis geografion kaj astronomion, natursciencan kaj fizikon; pri la historio ŝi lernis eĉ pli ol oni postulis. Nur la pianoludon, kiu ankaŭ estis deviga parto de edukado, ŝi ne ŝatis.

Je sia dekokna naskiĝtago ŝi, post nelonga konatiĝo, edziniĝis al Arno Dotzky, husara oficiro, fiera pri sia profesio en la aŭstria armeo. Ankaŭ ŝi fieris pri tio. Baldaŭ naskiĝis filo Rudolfo, kies destino jam ekde la lulilo estis klara – oficiro.

Sed la politika situacio en Eŭropo komplikiĝas. Rilatoj inter Aŭstrio, Italio kaj Napoleona Francio pliakriĝas. Batalo en Sardinio. Arno Dotzky devis kunmarŝi en Italion ... La unuan fojon la imagoj de Marta pri la milito ŝanĝiĝas – kiel edzino kaj patrino, ŝi sentas timon ... „*bataalkampo*” — *strange, kiel tiu vorto sin nun prezentis al mia spirito kun du tute malsamaj signifoj. Duone kun la kutima, historia, patosa, admirinda signifo, duone kun la naŭziga signifo de la sangaj, brutaj silaboj "batal"* ... *Jes, batitaj, buĉitaj ili kuŝas sur la kampo, la kompatindaj homoj — kun disstarantaj, ruĝaj vundoj ...*“

Arno, la edzo, estis mortigita en batalo ĉe Solferino ... ŝi tristas, dum kelkaj jaroj ŝi evitas sociajn eventojn, balojn, kunvenojn, kiujn ŝi antaŭe ofte frekventis.

Krom la itala militaventuro kaj „heroa“ forpaso de la edzo havis gravan influon je ŝia pensmaniero la hazarde elpruntita libro *“History of Civilisation”* de Thomas Buckle. *„La tradician admiron, kun kiu aliaj historiistoj kutime rakontas la vivon de potencaj konkeristoj kaj landdetruistoj, mi en Buckle ne trovis. Male, li atestas, ke ŝatado de la militista profesio estas laŭ inversa proporcio al la civilizo de la popolo: ju pli oni malantaŭeniras en la barbaran estintecon, des pli oftaj estas la militoj inter la homoj kaj malofta la paco.*“

Ŝi enamiĝas kaj edziniĝas al leŭtenant-kolonelo barono Tilling, germano, kiu servis en la aŭstria armeo. Ili havas similajn opiniojn pri la vivo, pri la socio, pri militoj ... sed li (kontraŭvole) devas partopreni la militon kontraŭ Danlando. Marta denove timas pri la destino de la edzo – sed li feliĉe revenas nevundita.

Sed venas alia milito – la prusa-aŭstria ĉe Hradec Králové (tiama Königgrätz) ... La historio estas konata, la aŭstroj kruele malvenkis. Neniu informo pri la destino de la amata edzo. Ĉu li estis vundita aŭ eĉ mortigita? Ŝi decidas iri al la bataalkampo kiel flegistino kaj trovi lin ...

Kaj tiu parto de la romano estas la plej terura ... la priskribo de militaj teruraĵoj. Tiu parto sola farus el ĝisosta militisto fervoran pacamanton. „... *dekstre kaj maldekstre aŭdiĝas dolor- kaj helpkrioj, kvankam eĉ sur la rapidantojn falas kugloj, tiun aŭ alian faligante. Ĉiam antaŭen, preterpasante homojn tordiĝantajn pro doloro de siaj vundoj, piedpremitajn de ĉevaloj rapidantaj super ilin, aŭ frakasitajn de kanonoj veturintaj super iliajn membrojn ... Biena domo, kie oni enloĝigis cent vunditojn, ilin bandaĝis kaj refreŝigis — la kompatinduloj kontentaj kaj dankaj, ke ili estas savitaj — kaj subite alflugas grenado, kiu flamigas la tutaĵon — la krioj, kriegoj elirantaj el tiu loko de malespero kaj superantaj ĉiun alian bruon... Ekzistas io ankoraŭ pli terura ol batalkampo dum la batalo — tio estas la kampo p o s t la batalo. Ne plu tondrado de kanonoj, ne plu sonado de fanfaroj, ne plu rulbruo de tamburoj, nur mallaŭta, dolora ĝemado kaj stertorado. Sur la piedpremita tero ruĝe lumetantaj marĉetoj, sangaj laĝetoj; ĉiu kampfrukto difektita, nur ĉi tie kaj tie plugita kampo netuŝita; la antaŭe belaj vilaĝoj fariĝintaj ruinoj kaj rubo. La arboj de la arbaroj faligitaj kaj karbonigitaj, la plektobariloj disŝiritaj de kartoĉoj ... Kaj sur tiu batalkampo miloj kaj miloj da mortintoj kaj mortantoj — mortantaj sen helpo! Sur la vojoj kaj herbejoj ne vidiĝas floroj, sed nur sabroj, bajonetoj, tornistroj, manteloj, renversitaj municiaj veturiloj, dispecigitaj pulvoĉaroj, kanonoj kun rompitaĵoj afustoj... „*

Feliĉe Friedrich revenas nur nedanĝere vundita – kaj decidas forlasi la armeon. „*Fariĝis nun ĉe mi fiksa ideo: Ĉiuj militoj devas ĉesi. Kaj ĉiu homo devas laŭpove kunhelpi, por ke la homaro alproksimiĝu al tiu celo. La militistan metion mi forlasis ... nome mi tion faris pro konvinko akirita mem dum milito. Mi nun volas labori por tiu konvinko. Mi eniras la servon de la pacarmeo. Ĝi ja estas ankoraŭ nur tre malgranda armeo, kies batalantoj ne havas aliajn defendilojn kaj armilojn ol la ideon de justeco kaj la homamon. Tamen ĉio, kio poste fariĝis granda, ja havis malgrandan kaj malgravan komencon.*”

Li alproksimiĝas al la Ruĝa kruco kaj al la movado por malarmado. Tamen la memoro de la homoj estas tro kurta – okazas unu plia milito – prusa-franca, 1871. Kaj kun ĝi familia tragedio ...

Tie finiĝas la romano, romano pri amo kaj malamo, romano forte kontraŭmilita. Ĝi legiĝas kiel krimromano, senhalte, senspire. Ĝi estas libro pri amo, amo de virino al siaj edzo kaj filo, amo al ĉiuj homoj, kvankam ili kondutas kelkfoje kiel bestoj kaj forgesas sian prudenton.

Mi do pensis, ke mi scias ĉion pri la vivo de Bertha von Suttner, mi ja kredis, ke ŝi priskribas siajn travivaĵojn. Sed Vikipedio kaj precipe alia libro, el la plumo de Petro Chrdle mem, konvinkis min, kiel mi eraris. La libro nomiĝas „*Sen laco por paco*“ kaj ĝi estas vera biografio de Bertha. Leginte ĝin, mi eksciis pri vera vivo de la posta Nobel-premiito – mi ekkomprenis, ke ŝi ne povis travivi la militojn priskribitaj en la supre

priskribita libro. Sed Marta el la romano kaj Bertha el la biografio havis multajn komunajn trajtojn kaj travivaĵojn. La junaĝo, la edukado, internaj ŝanĝoj de ideoj pri milito kaj heroismo – la vivo de Marta kaj Bertha similas.

Marta kaj Friedrich el la romano fariĝis pacbatalantoj pro la teruraj travivaĵoj en diversaj bataloj. La vera Bertha kaj ŝia edzo Arturo fariĝis el admirantoj de viena nobela vivo kontraŭuloj de militoj pro propraj spertoj travivitaj dum la rusa-turka milito en Kaŭkazo – ili ambaŭ tiam vivis en Kartvelio kaj kiel volontuloj laboris en militlazareto. Do kvankam la priskribo de la batalo ĉe Hradec Králové baziĝas precipe nur sur la rakontado de la tiamaj ĉeestintoj, ŝi povis aldoni siajn proprajn spertojn.

La libro de Petro Chrdle ne estas amromano. Ĝi estas biografio kaj tial ĝi estas skribita en tute alia stilo. La romano de Bertha plenas je rekta parolo, kiu en ŝia biografio tute mankas. La biografio ne enhavas tiom da priskriboj de la amo de Bertha, kvankam ĝi kompreneble priskribas ankaŭ ŝian privatan kaj familian vivon. En ĝi estas priskribata precipe ŝia porpaca laboro, ŝiaj klopodoj konvinki la homojn pri la senseco de la militoj.

Ŝi estis (same kiel Marta) filino de aŭstria oficiro, nobeldevena (ŝi naskiĝis en Prago kiel Bertha von Kinsky, do ŝi estis ĉeĥdevena). Male al Marta ŝi ne estis riĉa kaj krome – eĉ kiam ŝi havis monon, ŝi ne kapablis mastrumi ĝin. Tial ŝia agado estus multe pli malfacila, se ŝi ne kapablus ligi kontaktojn kun gravuloj, kiuj kelkfoje helpis ŝin finance. Ne eblas ne mencii ŝian amikan rilaton al Alfred Nobel, kiu ŝiajn kapablojn kaj agadon admiris kaj eĉ finance subtenis, kvankam ili ne ĉiam havis la saman opinion pri vojoj, kiel atingi la saman celon – la porĉiaman pacon.

Ne nur pri paco okupiĝis Bertha. Ŝi estis grava aganto en la movado de virinoj, kiuj tiam havis en la socio neniun alian rolon ol tiu de patrino, dommastrumantino aŭ eble instruistino. Ŝi batalis por la egalrajteco de virinoj, same kiel ŝi subtenis la batalantojn por la rajtoj de judaj kuncivitanoj. Ŝi batalis kontraŭ antisemitismo, precipe dum pogromoj en la periodo de Dreyfus-afero. Ŝi verkis artikolojn por diversaj taggazetoj kaj revuoj, verkis librojn. Ŝi ofte prelegis pri siaj ŝatataj temoj dum kunvenoj de diversaj societoj. Ŝi estis verkistino, aŭtoro de pli ol dudek libroj – sed la plej fama, plej tradukata kaj legata libro estis „*For la batalilojn!*“

Do, se vi volas konatiĝi kun la verko kaj vivo de la unua ina Nobel-premiito pri paco, mi rekomendas ambaŭ librojn, eldonitajn de KAVA-PECH. „*For la batalilojn!*“ estas furora amromano, priskribanta vivon de nobelino sur la fono de la periodo de multaj militoj en Eŭropo, kiuj faris el ŝi fervoran kontraŭulon de militoj. „*Sen laco por paco*“ kompletigas la informojn trovitajn en la amromano kaj metas ilin sur ĝustan lokon. Dankon al Petro Chrdle por reeldoni la romanon kaj por verki la biografion!

Karel Gott por ĉiam

Pavel Veselý

Homoj, kiuj superestas el ordinara averaĝo kaj subaveraĝo, kiun ni nomas normaleco, havis ĉiam malfacilan pozicion. Ne nur en nia historio, sed ankaŭ en la mondo. Nenio nova montriĝis post la morto de Karel Gott. Rare iu scipovas tamen imagi premon, kiu estis entreprenita al li el diversaj flankoj. Se iu



iĝas escepta per sia talento kaj dura laboro, li ĉiam estas puŝata, ke li tiujn siajn donacojn jungu favore al iu ideologio. Sed li restis li mem. Karel Gott helpis al Jiří Suchý, al Marta Kubišová kaj ankaŭ al Ĉarto 77. En la jaro 1979 aperis kanto „Kien tiam iris mia frato Johano“, kiu estis rememorigo de Jan Palach en la epoko de normaligado. Karel Gott multajn homojn ĝuste per sia aŭtoritato kaj per sia persono aŭspiciis kaj per tio helpis al multaj.

Totalisma reĝimo, pli ol ia ajn alia, instruis homojn alproprigi al si vivojn de aliuloj. Cetere faras tion ĉiu tia reĝimo. Oni parolis pri niaj artistoj, niaj instruistoj, niaj pastroj. Ja la nacio devas esti unuigita. Ĝi devas havi unuecan opinion. En unu dokumento Karel Gott kvalifikas tute prave la evoluon post la jaro 1989. Ĉu anstataŭiĝis la nacio? Ĉu anstataŭiĝis homoj en ĉi tiu lando? Ĉu la pli fruaj foriris kaj venis aliaj? Ne. Ni pensis, ke per svingo de sorĉa vergo lupoj turniĝos en ŝafojn kaj ke ni ĉiuj kune plezuriĝos, ke ni estas ŝanĝitaj. Homoj kiel ŝafoj estis malkaptitaj el gregejo. Kaj ĉar ili eksciis, ke libereco inkludas ankaŭ respondecon, ili revenas lastatempe denove en la gregejon. Karel Gott diris tion precize kaj li sekvis tion, kion li faris jam antaŭe. Alta profesia nivelo, diligenta laboro. La rezulto estis, ke li povis pli libere eldiri siajn opiniojn. Kaj li ja faris tion.

Sed li estis ankaŭ tre modesta kaj introverta homo, kiu al multaj homoj helpis kaj ne parolis pri tio. Tio estas multe pli grava. Per pezo de sia persono li povis protekti kaj protektis multajn. Kontraste al aliaj. Ĉu devus esti konate? Kaj ĉu indas? Estas necese montri „Rigardu, mi helpis al tiu aŭ

tiu“? Iuj homoj ŝatas fari tion. Ili bezonas, ke ĉiuj sciu pri ilia helpo, por ke ili montru siajn kvalitojn. Karel Gott estis esence introvertulo, kiu ne bezonis pri tiaj aferoj paroli. Tio estas ĉio. Li estis celebrulo. Tamen ĉu la nacio rajtas rigardi ĝis lia kuirejo? Ne rajtas. Ĉiu rajtas je sia privateco, ankaŭ kiam oni estas publika personulo. Oni per tio ne iĝas posedaĵo de popolamaso. Oni per tio ne iĝas persono, kiu prirespondos al ĉiuj. Gravaj estas faktoj. Kaj ili parolas klare. Karel Gott estis la sama homo kiel ĉiuj. Kun ĉiuj pozitivaĵoj kaj ankaŭ negativaĵoj. Tamen li disdonadis ĝojon. Li ankaŭ estis persono de tutmonda formato.

Ni parolas hodiaŭ ĉiam pli pri dividita societo. Ĉion ni volus unuigi. Sed ĉu vere unuiĝo estas signo de la demokratio? Ĉu vere unu, certe prava kaj garantiita opinio, estas signo de la demokratio? Ne estas. Demokratio estas diskuto. Kaj ĝi povas esti ajne akra, sed la rezulto devus esti, ke la diskutantoj scipovas ankaŭ poste paroli unu kun la alia. Tio validas ĉie: en politiko, en kulturo kaj ankaŭ en interhomaj rilatoj. Ni ŝatas dividon de la societo personigi. Tiuj aŭ aliaj kulpas, ke ni estas dividitaj, ke iu havas alian opinion. Ĉasado de vero, de unika vero, gvidos nin al mallibereco kaj totalismo. Vero ja estas nur tiam libera, se neniu absolute posedas ĝin. Kaj tion ni post 30 jaroj ekde la Velura revolucio ankoraŭ ne finlernis. Espereble tio iam trafos en sukceson.

Karel Gott kunigadis homojn per sia persono. Li kunigadis homojn de diversaj opinioj. Li estis granda ĝentilhomo, deca homo kaj granda profesiulo. Al multaj homoj li helpis kaj ne tro parolis pri tio. Kaj ĝuste tion faras personoj. Lia heredaĵo devus esti ĉiam viva. Mi neniam forgesos nian renkontiĝon en la klubo Mecca. Kaj ne nur tie. Sinceran kondolencon indas esprimi al la familio de Karel Gott, al lia edzino Ivana kaj al la filinoj. Al ĉiuj kvar filinoj. Li estis antaŭ ĉio ilia paĉjo kaj poste kantisto. Karel Gott por ĉiam.

Du paroloj en la katedralo (*la 12-an de oktobro 2019*)

Dominik Duka:

Estimata sinjorino Gottová, karaj filinoj, la tuta malĝojega familio, funebraj gastoj, reprezentantoj de nia ŝtato, sinjoro prezidento, reprezentantoj de la parlamento, reprezentantoj de nia registaro kun nia ĉefministro surfrunte, vi geamikoj kaj admirantoj de la mortinta majstro Karel Gott, ĉi tie en la katedralo de sanktaj Vito, Venceslao kaj Adalberto kaj Virgulino Maria, gastoj ĉe televidaj riceviloj.

Laŭreato de sennombraj muzikaj premioj Karel Gott estis venigita, por ke li al sia kreinto faru bilancon de sia longa kaj plenigita vivo, kiel li utiligis *talantojn*, kio signifas talentojn, kiujn al li Dio konfidis.

Tio estis donaco de bela voĉo, arto de interpretado kaj rideto ligita kun nobleco, per kiuj li plenigadis per ĝojo milionojn da aŭskultantoj enlande kaj ankaŭ en eksterlando. Ĉu tio estis en koncertaj haloj, sur teatraj podioj, en radiaj kaj televidaj transmisioj aŭ en niaj hejmoj, kie lia voĉo plenigadis spacon de niaj domoj.

Li famigis nin en la tuta mondo. Kaj certe ankoraŭ jarojn homoj aŭskultados liajn kantojn. Li komencis sian artistan vivon en la 60-aj jaroj, en la jaroj de signifa malstreĉo, kiu permesis al li, ke li plene disvolvu sian talenton. Des pli malfacile estis poste kontentiĝi kun la marasmo de la normaligado.

Li estis malavara kaj volonte helpadis al homoj en premo kaj mizero. Pri tio mi donis ateston baze de interparolo kun la amiko Václav Havel. Ni povis legi aŭ aŭdi ankaŭ vicon da aliaj atestoj.

Li rekonis valorojn, kiuj igas homan vivon bela kaj riĉa. Kaj ofte lia konscienco metis al li demandojn, por kiuj li serĉis respondojn, kiel pri tio atestas la lasta intervjuo kun sinjoro redaktoro Kubal.

Li ŝatis siajn geamikojn kaj amis sian familion. Li scipovis kunigi amon kun estimo kaj respekto. Al multaj li povus respondi per la vortoj de Jesuo: Ne juĝu, por ke vi ne estu juĝataj. Por ĉiu el ni validas, ke ni ne sukcesus, se ni ne invokas mizerikordon. Multaj tamen en nia lando malsuprenĵetis el piedestalo Dian majeston kaj anstataŭas tiel Dian juĝon per sia propra juĝo, kiu permesas al ili malaprezi ĉiujn principojn de dececo kaj justeco.

Pri mortintoj oni parolas kun estimo kaj dankemo, konsciaj ankaŭ de niaj propraj eraroj. Ĉiuj, tiel kiel li, ekstaros antaŭ Dia juĝo kaj juĝos nin tiu, kiu estis juĝata kaj maljuste kondamnita.

Tio estas vortoj de poetino Suzanne Renaud: Tiel, kiel kiam tra reĝa pordego eniras potenculoj de tiu ĉi mondo en nian katedralon kaj super ili dismalfermas sian plenbrakon Kristo juĝisto en tiu fama mozaiko kaj ni vidas liajn trapikitajn manojn kaj kruojn, spilita flanko kaj spuroj post vipbatado. Ĉi tiuj vortoj estas ilustraĵo al la versoj de Suzanne Renaud.

Tio estas vortoj de espero, kiu kreskas el kredo kaj scias, ke la plej alta mezuro kaj normo de nia kaj ankaŭ de Dia justeco estas la valoro de vera amo. Majstro, mi parolas pri tiuj aferoj nur pro tio, ke mi protektu vin, ke vi estu dum via lasta vojo portata kun tiu honoro, kiu apartenas al vi.

Vian ĉerkon akompanas larmoj de bedaŭro kaj amo, kaj pro tio oni benos ĝin. Ankaŭ ĉiujn, kiuj venis adiaŭi vin kun honoro. Ke vi ripozu trankvile, ke vivu lando, kiun vi ŝatis. Ĝi estas ankaŭ mia, via, nia patrujo. Ripozu en sopirata paco, kiun donas Dio. Amen.

Jiřina Bohdalová:

Kun humileco, estimo kaj tremo mi staras en tiu ĉi magia loko, por ke mi adiaŭu Karel-on Gott-on. Nome de la tuta familio, edzino Ivanka kaj du malgrandaj filinoj, tio antaŭ ĉio. Sed ankaŭ nome de ĉiuj, kiuj amis lin.

Mi ne aŭdacas taksi nombron da funebrantoj, sed mi scias, ke mi ankaŭ estas unu el ili. Ĉi tiun malfacilegan taskon donis al mi Karel mem. Estis li, kiu decidis, ke ĝuste mi lin adiaŭos. Ideon li tamen kopiis de mi.

Mi klarigos tion: Ni estis tutvivaj geamikoj. Proksimaj per vidmaniero je la vivo kaj ankaŭ je humuro. Mi estas pli aĝa je ok jaroj, kaj tiel mi ofte decideme ordonadis al Karel, ke devas esti li, kiu min, kiam mi forpasos en aliajn sferojn, adiaŭos.

Li promesis tion al mi, promesis. Kaj fakte unufoje li sian promeson ne plenumis. Aliokaze lia vorto ĉiam validis. Tio estis vorto de viro. Li tutvive atentis firman ordon, li estimis sian naturdevenan talenton kaj ne vantigis eĉ unu minuton. Li estis nekredible laborema.

Li altiris al si ĉiam laŭvorte tutan aron da elstaraj artistoj de sia epoko. Muzikistoj, kantistoj, aktoroj, reĝisoroj kaj plie multaj aliaj bonaj geamikoj. Kaj nature ankaŭ amatinoj. De siaj gepatroj li ricevis en genoj dececon, noblecon kaj ĝentilhomecon. Ĉi-rilate li estis viro de la malnova bona lernejo. Li estis tamen ankaŭ homo el viando kaj ostoj. Multfoje li eraris, falis kaj denove leviĝis. Multfoje li estis trompita de ĉarlatanoj, sed ankaŭ multfoje li helpis bezonantulojn sen atendi dankon.

Karel Gott nome estis bonkora kaj deca homo. Li forpasis bonteniĝita kaj sinfordona de ordigita tablo. Kun pura ŝildo, interkvitigita kun si mem, kun siaj infanoj, familio, kun devoligaĵoj, admirantoj kaj favorantoj. Sur la vojo al si mem li trovis jam antaŭ longe sian Dion. Ankaŭ pro tio li post tiu ĉi nefacila vivovojo forpasis trankvile. Dormante, ĉirkaŭita de forto de amo de siaj tute plej proksimaj, edzino Ivanka kaj du pli junaj filinoj Charlotte kaj Nelly.

Adiaŭo kun Karel estas malfacila, malfacilega. Ĝi kondukas tra larmoj, tra riveroj da sinceraj larmoj, kiuj estas en nia iome krustiĝinta epoko jam rara artiklo. Nekredible forta ondo de vera homa sento verŝiĝis post lia forpaso tra nia korteto, sed ankaŭ tra la granda Eŭropo, kaj tuŝis ĉiujn lokojn, kie Karel postlasis sian spuron.

La momento estis trista, sed samtempe ankaŭ fasciniga. Kiom multe donis unu viro, abundanta je talento, laboremo, humileco kaj sukcesvolo al profesio, kiun li elektis. La bilanco estas fasciniga. Kaj mi, kiu kun li kaj apud li paŝis per vivo, nur plu miras antaŭ la listigo de tio, kion li atingis.

Indas danki. Li donadis al homoj ĝojon kaj vivemon, li postlasis belegajn kantojn, sian delikatan tenorvoĉon kaj ĉefe bonhumoron kaj rideton. Kaj tio de unu komedianto ne estas malmulte. Per siaj kantoj li kunigadis tutajn generaciojn kaj proksimigis najbarojn. Kaj tio estas honoriginda.

Karel ne pardonas al mi, se mi mian parolon almenaŭ iomete ne malpezigu. Do, Karel, kalkulu tie pri mi kaj tenu al mi lokon. Mi havas por vi unu vere brilan judan anekdoton. Estu al vi la tero leĝera. Mi amas vin kaj mi ne estas sola en tio. Via Bohdalka.



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Prago
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Vydavatel:

Klub esperantistů v Praze

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

IČO 66004322

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7